

Leterkesto 3.

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 1990-010-B-3

Cl.- Parolas Claude kaj Andrée Gacond nome de Svisa Radio Internacia. Kiel ni diris pasintsemajne malfermante nian leterkeston, alvenis mesaĝoj de 36 landoj de 166 aŭskultantoj. Al tiuj skribintoj ni respondas laŭ la alfabeto de ilia familia nomo.

Ni komencas salutante CHOI You-Sik en Seulo (Suda Koreio) skribis :

A.- "Preskaŭ ĉiumerkrede mi aŭskultas vian radio-elsendon, kiu estas klareta."

Cl.- Bogdam CHOJECKI en Gdańsk-Oliwa (Pollando) sin prezentas tiel:

A.- "Mi havas tridek tri jarojn kaj mi estas invalido. Kiam mi estis infano mi malsanis je meningoj kaj ĝis hodiaŭ pro tio ne tute sukcesan kuracadon mi havas kaj inertan dekstran manon. Do mi estas sola, ĉar kiu fraŭlino volus ĵeti rigardon al mi invalido. Mi lernis esperanton por korespondi kun la tuta mondo, ĉar mi sentas min sola."

Cl.- Eble aŭskultantoj, kiuj ankaŭ sentas sin solaj aŭ kiuj volas korespondadi, skribos al li.

A.- Jen lia adreso: Bogdam CHOJECKI, ul. Kolobrzaska 58E/32, 80-394 Gdańsk-Oliwa, Pollando. Mi ripetas literumante.

Cl.- Ni saltu al Singapuro, kie nin aŭskultas Barry CROWN. La poligloto Michel DARTIGO en Rennes (Francio) aŭskultas la elsendojn de SRI en ĉiuj lingvoj. Annie kaj Herman DECEUNINCK-BOLLAERT en Halie (Belgio) alte aprezas niajn elsendojn. Okaze de vizito en Svislando ili restadis en Dornach, kaj ili vidis en tiu vilaĝo multajn domojn en speciala stilo dirita organika. Tie ankaŭ troviĝas centro por konstrubiologio, en la germana Baubiologie. Ili petas, ke ni raportu pri tiu organizaĵo post intervjuo de la koncernuloj. Ni provos realigi tiun kontakton. Saluton al Francisco José DAVILA DORTA en La Laguna-Tenerife (Kanariaj Insuloj) kaj al L. DE BRUYNE en Bruselo (Belgio), kiu ŝatus aŭdi ankaŭ pri ĉiutagaĵoj kaj diras, ke la aŭdebleco estis tre bona tra tuta Pollando, kie li partoprenis la 6-an kongreson de polaj esperantistoj-fervojistoj. Li konstatis, ke per la esperanto-elsendoj ni verŝajne atingas en tiu lando pli da homoj, ol per naciaj lingvoj kiel la germana, franca kaj itala. Li nenion diras pri la angla. Eble li ne malpravas. Por orienta Eŭropo la korespondaĵoj ricevataj de Svisa Radio Internacia dum la periodo de la 1-a de januaro ĝis la 31-a de oktobro 1989 dividiĝis tiel laŭ la lingvoj:

A.- Unuan lokon okupas esperanto kun 89 korespondaĵoj. Okupas la duan lokon la angla kun 35 korespondaĵoj, tria loko venas la franca kun 34, kvara loko la germana kun 29, kvina loko la itala: 28, sesa loko la araba: 6, sepa loko la portugalia: 5 korespondaĵoj.

Cl.- Oni konsideru, ke esperanto havas nur po tri elsendojn dekminutajn semajne, dum la nacilingvaj programoj havas multe pli longan elsendan tempon. Do almenaŭ por Orienta Eŭropo ekzistas esperanto-publiko. Janine DEREDEC en Grandchamp (Francio) skribis:

A.- "La ricevo, sufiĉe ofte, estas tute malbona apud la atlantika marbordo. Sed foje mi povas fari bonajn registraĵojn".

Cl.- Jacques DONY en La Ricamarie (Francio) regule raportas pri siaj aŭskultimpresoj. Jerzy DRYJA en Legionowo (Pollando) estas 40-jaraĝa turismoficisto loĝanta en apudvarsovia urbo. Ni citas lin:

A.- "Ege kreskis ĉe mi intereso al Svislando. Helpas al mi en tio la disaŭdigoj de SRI en la angla kaj esperanto. Mi bedaŭras, ke viaj esperanto-elsendoj por Eŭropo malbone aŭdeblas kompare kun tiuj interkontinentaj."

Cl.- Esperanto-Klubo en la Kultura Domo en Senica (Ĉeĥoslovakio) informadis ankaŭ pri Svisa Radio Internacia en esperanto-ekspozicio. José Julián FAJARDO en La Laguna de Tenerife (Kanariaj Insuloj) sendis aŭskult-raporton kaj Ireneusz FIEDOROWICZ en Bialistok (Pollando) vivsignon, kiun ni recipokas. Josef FISCHER en Nordwalde ŝatis la priartajn elsendojn de Pascal DUBOURG. Li sendis fotokopion de artikolo pri esperanto, bedaŭrinde sen la necesaj sciigoj: aper-dato mankis.

A.- Ĉiam om donu la ĉisekvajn sciigojn: Ekzaktan nomon de la gazeto, redakci-urbon, daton de la apero de la artikolo. Tiel ni povas arkivigi la koncernan artikolon en la kolekton de Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia (CDELI) en la Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds.

Cl.- Sydney FOX en Cambridge (Britio) ŝatis elsendon de nia kolego d-ro Arthur BAUR pri Liĥtenŝtejno, landeto kiun li vizitis kun la edzino antaŭ kvar jaroj. Ni dankas al Leo FRANZONI en Treviglio (Italio) pro liaj aŭdraportoj kaj al Riccardo GARDON en Milano (Italio) pro lia vivsigno. Carlo GELOSO en Torino (Italio) skribis:

A.- "Mi tre malofte skribas, sed ĉiam eble mi aŭskultas (kaj ŝatas) viajn elsendojn, ne nur en la itala, sed ankaŭ – aparte - en la esperanta lingvo. Pere de via vigla ĉeestado je la traĉielaj radio-ondoj vi donas ekzemplon (simplan kiel la ovo de Kolomobo aŭ la neŭtrala metra sistemo) por solvo de lingvobaroj en "komuneca domo" el Atlantiko al Uralmontoj (eĉ transen, kial ne?) kun drasta respekto al ĉiuj viaj aŭskultantoj. Do: ke ili kresku!"

Cl.- Juan Antonio GIMÉNEZ en Valencia (Hispanio) raportis pri aŭdo de elsendo kaj Lucien GILOTEAUX en Croix (Francio) sciigas al ni, ke ŝia filino, nun en Aŭstralio (Sydney), jam sukcesis aŭskulti niajn programojn en la internacia lingvo. Kaj li informiĝas, ĉu ni konas en Svislando la Movadon sen Nomo.

A.- Se ni ne eraras, tiu movado estas nekonata en Svislando, dum ni scias, ke en Belgio ĝi viglas.

Cl.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Claude kaj Andrée Gacond daŭrigos la salutadon al la geaŭdantoj la venontajn semajnojn. Ĝis reaŭdo!